ISSN 0337.5838
N°134-35
Junio - Oktobro 1981
prezo 4 Ff

# LA JUNA PENSO

ORGANO DE LA JUNULFAKO DE SAT

# ESPERANTO




# MONDO DE PROGRESO KAJ KOMPRENEMO

LA JUNA PENSO
67 avenue Gambetta
75020 PARIS

Esperanta Gazeto
devus aperi dumonate

# ENHAVO


Deklaracio de la 53 SAT kongreso en Rijeka pri lingva politiko p 3
Gvidrezolucio p 3-4
For la (id) klerikalismon p 4
Filatelista rakonto p 5
Poemoj k kantoj p 6
Internacia seminario de tejo en strasburgo p 7-11
Popola danco p 12
Pri Kristanismo p 13-14
Cirkulantaj leteroj p 15-18

DEKLARACIO DE LA 53a SAT-KONGRESO EN RIJEKA PRI LINGVA POLITIKO

KONSIDERANTE LA FAKTON,

- Ke la situacio en la mondo, karakterizita de la danĝeraj perspektivoj de la blok politiko.k.konfronto inter la ekonomie forta nordo kaj la ekspluatata sudo, de la kreskanta premo de la transnaciaj societoj sur la labor- kaj vivkondiĉoj de la homoj, trudas ĝeneraliĝon de la internaciaj rilatoj;

- Ke ĉiuj rimedoj ĝis nun uzataj por solvi la lingvan problemon, restis ne nur nesufiĉe efikaj, sed eĉ plikomplikis ĝin, pro foresto de demokrata alternativo kontraŭ la kultura imperiismo, esprimiĝanta esence per la lingva diskriminacio, kiu jam devigis la plej multajn popolojn rezigni pri siaj lingvoj en internaciaj rilatoj;

LA KONGRESO Proponas al la laboristaro tutmonda, al ĉiuj ekspluataj popoloj kaj al ĉiuj progresemaj fortoj en la mondo, alpreni jenan principan orientiĝon en apliko de lingva politiko en internaciaj rilatoj :

- en rilatoj inter la popoloj kaj ŝtatoj la demokrateco kaj egalrajteco devas esti respektataj ankaŭ en la uzado de lingvoj;

- al neniu popolo oni rajtas trudi fremdan lingvon;

- respektata estu ĉiu genta lingvo kiel integra parto de genta identeco;

- en rilatoj inter la popoloj, neniu privilegio estu donata al iu ajn nacia lingvo, ĉar ĉiu privilegio naskas novajn sociajn diferencigojn en kultura, ekonomia kaj politika sencoj;

- opinias, ke lingvajn problemojn oni devas solvi laŭ la samaj principoj inter ĉiuj lingvaj homgrupoj, inter la grandaj kaj malgrandaj popoloj, inter lingvaj plimultoj kaj malplimultoj. Tiuj samaj principoj validu ankaŭ en rilatoj inter la ŝtatoj same kiel inter la nacioj kaj naciaj malplimultoj en multnaciaj ŝtatoj.

- proponas jenan solvon de la lingva problemo en rilatoj inter la popoloj :

- ĉiu principe rezignu uzi la propran nacian lingvon en rilatoj kun aliaj popoloj, kaj la Internacia Lingvo Esperanto, samgrade fremda kaj samgrade propra al ĉiu, fariĝu la dua lingvo por ĉiu kiel komuna lingvo por internacia uzo kaj esprimo de aparteno al la pli larĝa homa komuneco.

## GVIDREZOLUCIO

La 53a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, okazinta en Rijeka, Jugoslavio, de la 19a ĝis la 26a de julio 1980, kiu kunigis 380 partoprenantojn el 18 landoj, post diskuto kaj aprobo de la raportoj,

Konstatas, ke la laborista klaso, laborantaj popoloj kaj neevoluintaj landoj daŭre suferas pro la konstanta pliakriĝo de interŝtataj socipolitikaj kaj ekonomiaj interrilatoj, kies protagonistoj estas la grandaj blokaj ŝtatpotencoj;

Konscias, ke la nura eliro el la nuna kriza kaj militdanĝera mondsituacio estas kreado de nova pli justa ekonomia mondsistemo, egalrajta kunlaboro inter landoj, ĉiuj kulturaj, klerigaj kaj sindikataj organizoj, inter kiuj ankaŭ SAT provu eltrovi komunajn trajtojn de kunlaboro;

Konstatas, ke naciaj kaj internaciaj instancoj en siaj klopodoj solvi la energikrizon ĝenerale ne sufiĉe atentis la eblecojn de t.n. alternativaj,

daûraj energifontoj, kaj substrekas la neceson pli esplori kaj disvolvi tiujn energifontojn;

Konstatas; ke la ekzistantajn konfliktojn en la mondo akompanas la kultura imperiismo de la evoluintaj landoj. La lingva diskriminacio, kiu tenas la laboristaron en kvazaù analfabeta stato en internaciaj rilatoj, instigas la kongreson proponi,per aparta deklaracio, la uzadon de esperanto kiel demokratan alternativan principan sintenon al la lingva politiko en la nuna mondo;

subtenas la rezolucion de la Monda Sindikata Konferenco pri evoluo okazinta en Beograd en aprilo 1980 kaj trovas en ĝi terenon por komuna agado;

Emfazas la neceson dediĉi pli grandan atenton al la SAT-Junularo kaj Esperanto-junularo ĝenerale, ĉar ili estas la integra parto kaj bazo por la estonto de la laborista Esperanto-movado;

Notas la bezonon detale trastudi ricevitan proponon pri kunlaboro kun Mondpaca-Esperanto-Movado (M.E.M.) kaj esplori eblecon por kunlaboro kun ĝi kaj-same kun ĉiuj aliaj Esperanto-organizoj;

Konstatas kun kontento, ke la nuna kongreso okazis sub la aùspicio de jugoslaviaj sindikatoj; ke la kongresanoj havis multajn kontaktojn kun jugoslaviaj laboruloj kaj ke ili povis ricevi respondojn al ĉiuj siaj demandoj pri la organizado de la jugoslavia socipolotika vivo surbaze de la laborista memmastrumado.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

For la (id.) klerikalismon

Ekzistas malfeliĉege multaj kaj diversaj blufoj inter kiuj la klerikalismo estas la plej elstara kaj impertinenta...

La juda ekzemple nomiĝas la plej elstara kaj unua ; kun la blufo pro Moseo, kiu laù la Biblio elvidis la sklavajn judojn el Egipto al la Sankta lando, kiu tiu tempe estis en la manoj de la filiŝtinoj (la palestimanoj).

Li, Moseo, vidis "Dion", Jehovo kiu donis al li ; la dek leĝoj (la leĝoj, tiuj ne estas malbonaj, sed kiu vidis tion ??).

Nuntempe la judoj, obeas la leĝojn : pli malpli ke oni ne murdu, nek rabu, nek diru malverojn sed, jen kion mi volas priparoli...

Mi ne bezonas iri malproksimen, mia parencano Ehjahu (Dio estas mia), ĝenerale la kristanoj kaj judoj portas la antaùnomojn el la "Sankta Biblio"... Emanuel (Dio estas kun ni... k.t.p. Adam ; Homo.

Tiu parencano Elijahu diris al la vidvino de mia kuzo ; se vi, kiel virino, ne povas preĝi pri la mortinto (ŝia edzo) do, li ne kuŝas trankvile sub la tero ĝis kiam oni preĝos la mortpreĝon dum la unua monato.

La malfeliĉa bofratino sen edza, sen pana, ploris ĉar ŝi kredis je la blufo, kaj mendis preĝiston.

Kia blufo !

Sed oni kredas ĝin.

HAIFA

## FILATELISTA RAKONTO

Kiam mi komencis kolekti poŝtmarkojn, mi estis dekjara, kaj mi ĝojis kiam mi trovis, en ĉokoladpakoj aŭ aliaj nutraĵpakoj, kelkajn mondpoŝtvinjetojn. Mi havis grandan plezuron kiam mi iris al la poŝtoficejo kun miaj ŝparaĵoj, por akiri la malgrandajn altvalorajn dentumitajn bildojn, kiujn mi metis hejme en malgrandan verdan klasifikkajeron.

En tiu epoko, mi specialiĝis pri la tuta mondo, kaj kun kelkaj kamaradoj, ni kunvenis por interŝanĝi multajn poŝtmarkojn en la korto de la lernejo. Ni praktikis tiam nur la interŝanĝon.

Post kelkaj jaroj, mi enskribiĝis en filatelia klubo kie mi ekkonis plenkreskajn filatelistojn kiuj instruis min pri fundamento kaj teknikoj de la poŝtmarkaroj.

Bedaŭrinde la interŝanĝado malaperis kaj lasis la lokon por la mono kiel moninterŝanĝo. Car ĉiumonate aperis multaj novaj poŝtmarkoj, mi devis specialigi mian kolektadon pri Francio, Germanio kaj Usono.

Dum kelkaj jaroj, mi familiariĝis kun la poŝtkolektado pri markoj el tiuj landoj laŭ kronologia ordo de la poŝtkatalogo. Post kelkaj jaroj mi konsciis ke tiu kolektadmaniero alportas ne multon kaj mi limigis mian faron al nur aĉeto kaj surgluado de vinjetoj. Mi do decidis forlasi pri la kolektado de Germanaj kaj de Usonaj poŝtmarkoj. Mi konservis tamen Francajn eble pro ŝovinismo aŭ pli simple ĉar la temoj estis pli familiaraj.

Mi komencis tiam studadon pri poŝtmarkoj laŭ la temo : malnova Rusio, antaŭ la revolucio. Post kelkaj monatoj dum kiuj mi serĉis dokumentojn, mi povis elmontri tiun Rusian poŝtkolekton en departementa ekspozicio de Filatelio. Mi akiris grandan plezuron kaj multajn konojn tiurilate kaj mia opinio pri filatelio ŝanĝiĝis. La ĝojo pro konkurado kun aliaj filatelistoj kaj la sporta spirito plaĉis al mi. Mi komencis tiam en la tematika poŝtkolektaro aŭ pli ekzakte en la tema poŝtkolektado : la Eŭropfolkloraj kostumoj, ĉar mi lernis esperanton jam de kelkaj monatoj, mi aneksis la universalan lingvon en mia kolektado. Fine, mi povis la Eŭropfolklorajn kostumojn ekspozicii en departementa poŝtekspozicio 79 kun tekstoj en Franca lingvo kaj en Esperanto.

Mi pensas ke poŝtkolektado ne rajtas esti pasiva, sed male, ĝi devas instrui min kaj aliajn, ĝi devas ankaŭ esti la portanto de mesaĝo, kiun ni devas komuniki al aliaj, okaze en poŝtfilatelioj. La profito ne estas la premio pro onia laboro, sed estas la partopreno pri la mesaĝo kiun oni volas diskonigi ĉirkaŭ si. Mi insistas pri la fakto ke Esperanto povas prezenti tra filatelio, grandan propagandan spacon al ekstera mondo. Ĉu nu tia aktiveco, kia estas filatelio ne povas helpi por la disvastigo de la universala lingvo kaj same, por la paco, justeco, toleremo kun respekto pri la homrajtoj. Mi petas esperantajn ĉiujn filatelistojn agi en tiu senco kaj sendi al mi filatelistajn artikolojn por FS.SAT.JL.

Rolando T.

---

## POR HELPI LA REDAKTANTOJN

Karaj geamikoj!

Ĉiuj artikoloj estas bonvenaj por apero en la Juna Penso. Sed okazas ofte, ke ni ricevas artikolojn preskaŭ ne legeblajn, kaj estas tre malfacile por ni kompreni ilin. Ni do petas vin ĉiujn, ĝentile fari vian eblon por bone skribi. Vi tiel helpos al nia laboro.

Dankon.

La Redakcio.

## DUM LA VINTRO

La malvarma vintro regas
kun rigido, sen kompato;
glacipluvas kaj ventegas
en la forlasita strato.

Malsatantaj korvoj flugas
turniĝante tra l'aero ;
la torent' sovaĝa muĝas
tra l'kamono kun kolero.

En la urbo nun izola
kovras ĉiu sin per skarpo
kaj lamentas laŭte pro la
multekosto de la karbo.

Pro la vintro mi ne veas
kiam apud mi vi estas,
ĉar vi ĉirkaŭ vi ekkreas
la printempon. Kaj mi restas.

kun silent' vin admiranta
dum je l'fundo de l'pejzaĝo
ekbrilegas ridetanta,
kvazaŭ sun', via vizaĝo.

JAN VAN SCHOOR

## PRINTEMPA VARIANTO

"Salte-dance, hop kaj hop !
Jen alvenas en galop'
Rajdoside sur skarabo
La Printempo, ĉarma knabo.
Junaj herboj, florburĝonoj
Jam borderas lian vojon
Kaj ĉielaj violonon
sorĉe zumas novan ĝojon !"

Tiel do, aŭ proksimume,
Poezio ekspluatas
La Printempon ; - interdume
Pli praktike mi konstatas,
Ke venteto-petolulo
Helpas miajn priokupojn :
Li ĉe ĉiu stratangulo
Blovas sub knabinajn jupojn...

Jen printempsezona ĝuo !
Mi admiras la naturon,
Se ĝis super la genuo
Ĝi malkovras belan kruron.

R. SCHWARTZ

## AŬGUSTO

Sur molaj, bronzaj ondoj
Lumeroj balance foriras.
Maturaj brunaj spikoj
Malsupren kliniĝas, sopiras.

Cejan' al konvolvulo
Rakontas pri strangaj aferoj :
" Jam baldaŭ blovos ventoj
Tra stoploj kaj kelkaj pajleroj"

M. STRÜMPPEL

## PLUVA SEZONO

Lastajn foliojn la vento balais
kaj densa nubaro,
lazuron kaŝante,
minacas la teron.

Kvazaŭ nubisto pluvkluzojn malfermis,
kutime, sezone,
la pluvoj aŭtunaj
densege gutadas.

Vitron fenestran pluveroj frapadas
sen fin', enuige,
simile al teda
libreg' sen ĉapitroj.

Hejme restante, sen ŝajna espero
pri ebla eliro,
mi pensas pri eblo
reformi sezonojn.

Kaj konvinkate ke sperto konsilas
obei prudenton,
mi hejme restante,
dezirojn prokrastas.

MISU BERARU

### Pliaj demandoj kaj respondoj

- Esperanto atingis nun ankaŭ Kamerunion, Zaïrion, ktp, sed mankas objektivaj informoj. Verŝajne la motivo estas konsciiĝo pri diskriminacio ĉe komunikado.
- La homaro bezonas 100 aŭ 150 jarojn por akcepti ion novan.

### Dua prelego de Claude PIRON : kiel superi la reziston ?

Ĉar la rezisto al Esperanto estas neracia, ni devas trafi la sentojn, ne la raciecon. Estas pli utile trafi la vidpovon montrante Asteriks, aŭ aŭdigi "Tra l'mondo" de Olivier Tzaut, ol dum duonhoro intelekte argumentadi.

Oni povas alvoki al la sentoj de indigno (pro la absurdeco de la nuna sistemo de komunikado), persona intereso (sed profiti per Esperanto estas malfacile), solidareco (ekzemple, la Tria Mondo bezonas medicinajn gvidlibrojn, kiujn ĝi efektive scipovu legi).

Sed necesas rezigni la deziron konvinki : ĉar la kunparolanto ne ŝatas esti atakata, ŝanĝota, traktata kiel nescianta infano ; ĉar dezirante oni emas timi la kontraŭon ; ĉar oni devas respekti la liberecon de la alia. Tiu rezigno ne estas facila.

Ni ne kredu, ke unua mencio pri Esperanto povas tuj konviki homon, sed konsideru, ke nia varbo estas elemento entuta ĉeno de varbado, al kiu partoprenis kaj partoprenos aliaj esperantistoj.

Konsiloj :

- ni devas prezenti faktojn, ne niajn opiniojn
- oni povas listigi la kutimajn kontraŭargumentojn
- gazetoj povas aboni al Argus, kiu sendas al la enskribiĝintoj ĉiujn artikolojn aperantajn en la ĉefaj gazetoj pri la elektita temo
- al gazetoj oni sendu leterojn de legantoj, ne pri Esperanto mem, sed pri lingva diskriminacio kostoj de lingvaj servoj, ktp.

### Diskutgrupoj

- ĉu varbi amase aŭ elekti celgrupojn ?
- oni povas agadi en grupo de varbantoj, kiuj montras, ke Esperanto vivas, simple, ĉar ili mem vivas Esperanton (en junularaj domoj, gastejoj, kulturdomoj, ktp)
- katastrofa estas la impreso de sekteco. Ni estu modernaj, aktualecaj, eĉ laŭmodaj (ekzemple pri la temoj de niaj glumarkoj), kaj uzu modernan materialon
- ni reviglígu ne aktivajn esperantistojn kreante kontaktojn kun aliaj asocioj.

### Ekzemploj de varbado

- Amri WANDEL prezentis varbadon per lumbildoj
- Bernhard PABST prezentis la teston 5000 de Germana Esperanto-Junularo.

## INSTRUADO

Adrian BUTLER prezentis la lingvajn kursojn de la Eŭropa Junulara Centro.
Ludoviko DE YZAGUIRRE kaj Stefan MAC GILL prezentis instrurimedojn por junuloj : teatraĵojn bildstriojn, lingvajn ludojn, kantojn, bildojn
Claude GACOND prezentis instruteknikojn : flanelan panelon, pergestan instruadon, teatron, lumbildojn.

### Diskutgrupoj

- estas bone movigi la lernantojn por uzi ilian muskolan memoron
- unuavica estu la praktiko, la teorio restu en la menso de la instruanto.

Aperis la aserto, ke instruanto devas bone koni la lingvon, kaj pedagogion. Tial necesas por instruantoj kursoj por perfektigo pri la lingvo kaj por studo de la metodologio de instruado, staĝoj, ekzamenoj por kursgvidantoj.

## MOVADO (temas pri TEJO)

### Prelego de Bruĉjo KASINI pri la rolo de landaj sekcioj

TEJO estas kontrolata kaj finance helpata de UEA. Ĝi havas siajn individuajn membrojn, sed al asociaj membroj ĝi rilatas nur pere de la landaj sekcioj.

La landaj sekcioj estas avantaĝo por la varbado. Ili organizas landajn aranĝojn, kie novuloj povas spertiĝi, antaŭ ol alveni en la internacian movadon. Tamen tio povas plilongigi la tempon, ĝis ili aktivas internacie. Se tiu kribrosistemo ne funkcias, la kuna ĉeesto en internacia aranĝo de novuloj kaj spertuloj estas ĝena.

TEJO funkcias kiel ligilo inter la landaj sekcioj.

Prelego de Stefan MACGILL pri : nia aĝo

- En la mondo, ĉirkaŭ 40 % el ĉiuj homoj estas malpli ol 25 jaraj. En UEA nur 22 % de la asociaj membroj. Tiu procentaĝo apenaŭ ŝanĝiĝis dum la pasintaj 15 jaroj.
- Mankas la meza generacio : kiam la junuloj atingas la aĝon forlasi la junularan movadon, la landa movado estas tre maljuna, kaj UEA tro fora por instigi ilin resti en la movado.
- 70 % de malmenbriĝantoj el TEJO rezignas post unujara membreco.
- En Okcidenta Eŭropo, la junularo estas subreprezentata, escepte en FR Germanio kaj Belgujo. En Orienta Eŭropo, estas ĉefe asociaj membroj, ĉefe en Bulgarujo, Pollando kaj Hungarujo. Estas surpriza la malmulteco de junuloj en la sudamerika movado.
- Tamen pozitivaj estas praktikaj agadoj, kiel la pasporta servo, kaj la renkontiĝoj de TEJO kaj de la landaj sekcioj.

Estas proponataj kreo de alloga budomaterialo, nacilingvaj fotoserioj pri komunikaj problemoj, internaciaj seminarioj pri varbado, instruado, utiligo de Esperanto, bele ilustritaj broŝuroj por bonvenigi novulojn, dungado de juna vojaĝemulo.

Reago al la prelego pri aĝo

- Amri WANDEL, el Izraelo, opinias, ke por homoj loĝantaj ekster Eŭropo, TEJO pli gravas, por ke ili havu rilatojn kun la cetera mondo.
- Ludoviko DE YZAGUIRRE proponas, ke oni plialtigu la aĝlimon de TEJO ĝis 30 aŭ 35 jaroj.
- oni devas varbi por Esperanto kiel komunikilo, anstataŭ kiel "nia kara lingvo".
- Membroj pli junaj ol 18 jaroj havas malfacilecon por pagi la kotizon.

Raporto pri la nuna stato de TEJO

La broŝuro pri la seminario mencias nur kelkajn komentojn pri la kongresoj de TEJO.

- La nombro de partoprenantoj kreskas. Sed tro vasta kunveno estas pli malfacile organizebla, kaj pli timigas la novulojn.
- Prefere estus plimultigi la nombron de la kunvenoj. Nun okazas jare la Internacia Junulara Kongreso, la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo kaj la Internacia Junulara Festivalo en Italujo.

Necesas diskuti :
- ĉu IJK estu pli distra aŭ pli studa
- la eblecon, ke ĝi denove okazu ekstereŭrope, ĉu azie, ĉu amerike, aŭ, ĝin okazigi samtempe en du kontinentoj, kun paralelaj programoj.

APLIKADO

- Christian DARBELLAY transprenis la taskon fari sliparon de sciencistoj, kiuj scipovas Esperanton.
- Raportis la vidbenda grupo.

EKSTERAJ RILATOJ

Prelego de Renato CORSETTI pri la historio de la Komisiono por Eksteraj rilatoj de TEJO

1960-1965
En 1960, en la kongreso de Roterdamo, estis antaùvidita informado al neesperantistaj junularaj organizoj. En 1961 estis dissendita anglalingva broŝuro pri la kongreso de Wokingham. En 1964, reprezentantoj de kelkaj internaciaj junularaj organizaĵoj partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Amsterdamo, kaj poste reciprokis invitante TEJO-reprezentantojn al siaj kunvenoj. En 1965, TEJO organizis apud Ljublijano seminarion pri lingvaj problemoj en internaciaj junularaj rilatoj, kun reprezentantoj de la internaciaj junularaj organizaĵoj.

1966-1969
En 1966 formiĝis la nuna komisiono pri neesperantistaj junularaj organizaĵoj. Dum tiu periodo okazis instruado de Esperanto en labortendejoj de la Internacia Volontula Servado de Unesko kaj seminarioj por gvidantoj.

La deklaracio de Tireso (1969)
Ĝi rekonas, ke "ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj", malaprobas kulturan diskriminacion kaj lingvan imperiismon. Ĝi antaùvidas esploron kaj informadon pri la neadekvateco de la monda lingvo situacio, kaj pri ĝia kunligo kun la detruo de la homa personeco en la nomo de teknologia kaj ekonomia programo.
Tiu deklaracio estis ege utila por veki la movadon, ĉar ĝi respondis al la demando "kial mi lernu Esperanton". Sed en ĉiu mondparto ĝi estis interpretita alimaniere.

1971-1980
Okazis ĉiujare internacia seminario kaj estis kreataj gazetara servo "Sufoko" kaj gazeto "Etnismo".

Estonteco
Oni kritikas la sinturnon nur al gvidantoj, kaj volas pli atenti la bazon.

Tiu malfermo al ekstera mondo estis grava por la interno : la movado interesiĝis pri la tria mondo kaj aktualigis sian ideologian sistemon.

Eksteraj rilatoj ne utilas por alporti rekte novajn kursanojn, sed por altigi la prestiĝon de Esperanto-organizaĵoj.

## Diskutgrupoj

Unua grupo

1. Du homoj diris, ke ili ne agas en aliaj organizaĵoj. Unu diris, ke li agas en la flandrisma movado, kaj ke tie li ankaù agadus eĉ se li ne estus esperantisto. Alia diris, ke ŝi estas aktiva en la virina movado, sed nur de kelkaj jaroj. Ŝi ankaù okupiĝas pri tio en UEA, sed opinias, ke la du ne estas ligitaj. La tria diris, ke ŝin interesas la junulara teatro, ĉefe pri sociaj kaj politikaj demandoj. Ŝi ankaù interesiĝas pri la tria mondo, ekstera politiko kaj virina agado.
2. Unu persono diris, ke li interesiĝas ĉefe pri scienco. Li ankaù klarigis, ke li ne aparte interesiĝas pri la ĉiutagaj reinformoj pri subpremo, sociaj maljustaĵoj, ktp. La dua respondis, ke li ŝatas legi pri problemoj de malplimultoj, inkluzive, sed ne nur, lingvajn. La lasta respondis, ke ŝi emas informiĝi pri mondaj okazaĵoj kaj sociaj problemoj.
3. Ĝenerale, la respondintoj diskutas pri politikaj kaj sociaj demandoj. Kelkaj aparte ŝatas diskuti pri ekspluatado de tero, de virinoj, de la tria mondo, pri sciencaj trovaĵoj, pri psikologio kaj filozofio, ktp.
   Laù unu partopreninto, oni devas malakcepti lerni lingvojn pro ekonomia superrego ; tial Esperanto estas parto de ŝia politika sinteno.

Dua grupo

Kelkaj opiniis, ke la nuntempa junularo ne plu interesiĝas pri politiko. Leviĝis la fakto, ke la plej gravaj kontribuoj al ekstera agado venas de la lokaj kaj individuaj provoj, ne de la tutlandaj aù internaciaj organizoj. Oni kredis, ke oni devas emfazi Esperanton kiel rimedon, anstataù kiel celon en si mem.

Laborplano por la komisiono de Eksteraj Rilatoj de TEJO

- ĉu TEJO aliĝu al Eŭropa Kunordiga Buroo ?
- TEJO sendis kunlaborproponon al la Monda Federacio de Demokrata Junularo
- ĝi rilatas kun Unesko, Monda Federacio de Asocioj pri UNO, Internacia Studenta kaj junulara Movado pri UNO
- ĝi estas invitita sendi reprezentanton al Bangalore (Hinda Unio) por la konferenco de la Kunordiga Komitato por la Internacia Volontula Servo,
- ĝi volas plifirmigi siajn rilatojn kun la Eŭropa Junulara Centro kaj eble fari duan seminarion en ĝia kadro pri nova ekonomia ordo.

## KUNVENO ĈE LA EŬROPA PARLAMENTO

Post vizito al la Eŭropa Parlamento, la seminarianoj renkontis du parlamentanojn, sinjorojn B. Patterson kaj M. Coppieters.

S-ro Patterson estis lastatempe nomita raportisto pri plurlingvismo fare de la Komisiono pri Junularo, Kulturo, Edukado, Informado kaj Sporto. Li parolis pri Komunik-problemoj en la parlamento kaj la komunumo. Li tuta 45-minuta parolado temis pri lingvaj demandoj, interpretado, tradukado, komputil-tradukado kaj pri Esperanto.

Li aparte menciis la problemonnde duoblaj relajsoj ; ĉar ne eblas traduki rekte de, ekzemple, la dana al la greka, oni devas unue traduki de la dana anglen kaj de la angla greken. Tio signifas ke la greka traduko estis malpli findinda ol la angla, kaj ke ĝi alvenas poste. Li ankaŭ diskutis la eblecon de "nesimetria" interpretado : ĉiu povus paroli en sia nacia lingvo, sed oni tradukus nur anglen kaj francen. La diskuto tuŝis ankaŭ la eblecojn kaj problemojn pri maŝintradukado. Ĉiukaze, li evidentigis, ke la Parlamento pli konsciiĝas pri la demando de komunikado, specife rilate la planatan plilarĝiĝon de la Parlamento kaj ĝiaj laborlingvoj.

Kiel raportisto pri plurlingvismo, s-ro Patterson estis petita de la menciita Komisiono prepari raporton pri la komunika problemo en la Parlamento, kiu priskribu gvidliniojn kaj celojn por pli detala studo fare de Komisiono al laborgrupo. Tiun dokumenton oni privoĉdonos frue en julio. El ĝiaj kvar paĝoj, unu plena alineo rekte aludas Esperanton en plejparte sed ne entute favora maniero. Ĝi tamen montras ke la kompilintoj certagrade informiĝis pri la internacia lingvo kaj akceptis kelkajn argumentojn favore al ĝi, danke al interalie la interveno de S-ro Coppieters kiu montriĝis tre favora al Esperanto. Gravas la lasta parto de tiu dokumento kiu listigas ok punktojn por plia esploro ; la sesa petas specife esploron pri Esperanto kaj aliaj intelekte kreitaj lingvoj.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

La cikado kaj la formiko
de La Fontaine (libera traduko)

Dum somero, cikado nur
Ja kantadis al bel natur'
Sed, kiam post
Sekvis la frost',
Pro neŝparo ĝi havis eĉ
Ne manĝaĵon ; Ve kia peĉ'
Nek eĉ vermetan peceron
Nek eĉ muŝetan visceron


Kun vere mizera mimik'
Ĝi alkuris al la formik' :
"Mi plorpetas, saĝa najbar'
Pardonu pri mia erar' !
Malstatmorton evitu al
Kompatinda frat-animal'
Kaj pruntodonu ĝis somer'
Eĉ nur eron de nutraĵer'
Mi repagos kun interez'
Nur fidu al mia promes'."

Formik' ne famas pri pruntem'
(Laŭ nura homa teorem')
Ĝi respondis kun moka ton' :
"Kiel pasis la belsezon' ?
- Nu por ĉiuj mi kantadis.
- Dum vi kantis... serenadis,
Mi laboregis ĝis aŭtun'
Ne plu kanto ! Vi dancu nun !"

**Moto**

# La Avelo (ponddanco)


muziko kaj paŝoj retroviĝ[?] laŭ la memoroj de Sigrid Bouchez kaj Anne-Sophie Lévy, atentemaj dormantoj de K-do Odd Tangerud, kiu animis la nun famajn dancvesperojn en Svanniko dum la 52a SAT-Kongreso.




d = dekstra piedo
m = maldekstra piedo

Knaboj kaj knabinoj tenas la manojn unu de la aliaj en rondo aŭ en farandolo. Ĉiuj faras la samajn paŝojn.

1a figuro:




same, sed inverse.




refari la 1an figuron duan fojon.

2a figuro:



refari la 2an figuron kvarfoje

3a figuro:



kaj same, sed inverse.

Rekomenci la tuton kvinfoje, aŭ ĝis finiĝo.

# PRI KRISTANISMO

En nia tre materialista epoko, la moralaj valoroj perdis el sia riĉeco. Oni celas al nur produktado kaj profito. Ĉu esti kristano signifas ankoraŭ ion ?

Mi dezirus pritrakti tie ĉi, mian modestan laboristan sperton rilate al la kristana religio, kiu komencis en katolika preĝejo ek de mia baptado. Kiel multaj samjaraj infanoj, la kateĥismajn lecionojn mi devis lerni pri krista vivo kaj ĝiaj pacaj paroloj. Sed ni pensis ke tiuj unuhoraj kunsidoj estis ĉefe enuigaj kiel la lernej·j kursoj.

Poste, ĉe mia dekdua jaro, okazis granda festo kiu por mi estis malŝparema kun la donacoj diversaj. Tio-ĉi' granda festo kies la nomo estas "solena komunio", estis okazo por vidi la tutan familion, kaj por la ĉefaj partoprenantoj, la kristanaj kaŭzoj de tiu-ĉi festo, tiu ĵuro kiu estis donata al Dio, estis nur akcesora. Tamen mi ne povas diri ke tiuj-ĉi jaroj estis senigitaj je teologiaj pripensoj, eĉ se simplaj. Sed mi pensas ke la kristana instrukcio donata al infanoj, krom baptado, ne estas bona por la infanoj, ĉar mi pensas ke tiu elektaĵo, ĵuro, devas ne fariĝi per la ordonema gepatra trudo sed en la tuta spirita libereco. Estas ne bone ankaŭ elekti la gebaptopatrojn, la persono kiu estas la plej malavara el la parencoj, aŭ por kontentigi superrangecan ordon kaj eviti en la familio malkonkordojn. La gebaptopatroj malofte estas elektataj pro siaj kristanaj ecoj kaj konoj. Mi opinias ke la tasko de la gebaptopatroj estas la infana instruado al ameca kaj simpleca vojo, gvidanta la kristaj paroloj. La jaroj sekvis kaj post la studoj, la militservo okupis min, kaj poste mi serĉis laboron.

Dum tiu-ĉi epoko mi ne zorgis pri la religio. Post kelkaj tempoj, mi renkontis personon kiu estis "Jehovah atestanto". Ni interparolis multe pri interesaj teologiaj problemoj, kaj dum tiuj paroladoj mi eltrovis libron kies la nomo estas "Biblio".

Tiu sinjoro instruis min ke la Dio de Abrahamo kaj la Dio de mia infana epoko estas la sama Dio, kiun li nomis "Jehovah", aliaj nomis lin "Elahim" kaj li diris al mi en la Hebreaj skribaĵoj, Dio nomiĝas (YHWH) : "Yahve". Ni diskutadis pri la naskiĝo de la Universo kaj pri la malfacilaj kaj belecaj mekanismoj kiuj regas la mondon, tiom da estaĵoj kiuj vivas kun ni, kaj ili pruvas cetere ke ili ne estas nur sur la tero pro kemiaj leĝoj sed ke ili estas verko de Dio, pri kiu mi nomas "Yahvé, Elahim, Jehovah aŭ Alaho", tiom da nomoj por sola Dio. Mi ankaŭ pensas ke nia scienca socio, la evoluismo, ne malkonfesas la ekziston de Dio sed pruvas ĝin.

Tiu ĉi scienco komencas nur montri la tutan komplekson kaj la riĉaĵojn de nia Universo kie oni vivadas. Scienco kiu devus doni al la homoj pli da malavareco kaj boneco.

Poste ni diskutadis pri la morto kaj li diris min, en la morto, la spirito ekdormiĝis en la "Hades" ĝis la kristreveno por la fina juĝado kiu estus okazonta, ĉar la 1914a generacio ne estus atingota dum tiu okazaĵo. La profetaĵo de "Sankta Malaĥio" informas nin ke pri ĉiu papo ekzistas unu devizo ; la nuna papo devizo estas "sunaj malfacilaĵoj".

Post la nuna papo, la devizo montras nur du papojn po unu devizo. La antaŭfina devizo estas "olivarba gloro" kaj la fina devizo estas "Petro, la Romanulo". Dum lia reĝado, la homoj sin prezentus antaŭ Dio.

Tiuj profetaĵoj kiujn oni antaŭvidas la monda fino eble ŝajnas ne ebla, sed se oni observas tiun-ĉi mondon, kie la mastroj estas la perforteco, la maltoleremo, la malmoraleco, mi esperas la verecon de tiuj profetaĵoj. Ĉu ni estas homoj aŭ bestoj ?

Pri la spirita morto, mi ne estas konvinkita ĉar antaŭ kelkaj monatoj, mi lernis libron pri kiu la titolo estas "La vivo post la vivo" kiu entenas personajn spertojn pri homoj kiuj preskaŭ tuŝis la morto. Tiuj personaj spertoj klarigas ke la spirito ne mortas dum la persona morto, sed vivas post la korpmorta de la homo, kaj tiu ĉi spirito renkontas aman kaj luman estulon, kiu estas eble Kristo. Mi pensas ke ambaŭ ideoj povas kunvivi. Kiam homo mortas, lia spirito estas liberigata el sia ujo kiu estis la homa korpo. Tiu spirito eble renkontas, en aliaj dimensioj, personajn spiritojn kiuj estis mortintaj antaŭe. Tiu ĉi hipotezo ne ekskludas la eblecon de la fina juĝo baldaŭ aŭ en pli malproksima tempo. Mi estis tre interesata kiam mi ekkonis la komunumon de Jehovah atestantoj pro iliaj humileco kaj kredo. Sed mi ne povas akcepti kelkajn regulojn kiel la malkonsento pri la sangdonaco aŭ la sangricevo per la sangtransfluigo. Mi povas kompreni ke oni rifuzas manĝi sangbeston laŭ la Biblio, sed mi rifuzas interpreti ĝin, kiam tiu-ĉi interpretado riskigas morton al la aliaj homaj vivoj. Mi rememoras la Dian leĝon "Ne mortigu". Mi memoras aŭtomobilakcidentojn, aŭ tertremajn katastrofojn kie la sangdonacoj savas multajn homojn.

Pri la politika problemo, mia opinio diferencas iliajn. La Jehovatestantoj rifuzas aktivi politike, ĉar ili estas atendantaj venontan Dian regadon. Mi ne pensas same, ĉar laŭ mi, kristano rajtas kaj devas aktivi politike. Kristanoj rajtas agi politike kaj sindikate pro nur sindonemo. La kristanaj agoj devas konduki la homojn al la libereco, la justeco, kaj la homa boneco. Tiu-ĉi agoj devas lukti kontraŭ la dekstra aŭ maldekstra absolutismo, la racismo, kiel la antijudismo, la perforto ĉe ĉiuj sociaj niveloj.

La kristano devas vivi en la respekto de la homaj rajtoj kaj la paco. Sed, mi pensas ke por resti objektiva, kristano ne povas aparteni en kiuajn politikaj aŭ sindikataj partioj en la nuna socio.

Mi ŝatus nun skribi pri la katolika religio, kiu seniluziigis min laŭlonge de sia historio pro ĝia spirita el divektiĝo. Mi pensas ke la katolikismo estas ~~pro~~ ne proksimiĝinta de la bibliaj skribaĵoj, per la perforto (la inkvizicio), la krucmilitoj aŭ religiaj militoj.

La Biblio postulas de la kristanoj, simplecon kaj humilecon, sed ĉiuj homoj konas la artajn, monajn riĉaĵojn, kiuj estas belaj artaj objektoj, de la katolika eklezio. Ne forgesu la grandegajn teritoriojn pli frua epoko.

En diversaj epokoj tiuj altrudoj okazigis skismojn kiel la protestantismon. En la nuna Epoko, mi pensas ke la katolisismo agas pli simple, pli pace sur interkomunikaj vojoj kun aliaj religioj. Mi ne komprenas la papon, kiam li diras ke lando estas la unua filo de la eklezio dum tiu-ĉi lando estas en la unua grupo de la armil-vendistoj kiuj malkleras al la subevoluintaj landoj, mortajn varojn, kiuj bezonas agrikulturajn materialojn kaj senpagan pacan teknologion.

Mi admiras la monaĥinan servopretecon, la malfierajn pastrojn, monaĥojn, aŭ la misiulojn kiuj kunportas siajn kredojn kun riskaj situacioj tra malproksimaj landoj.

Mi ne povas kompreni, kial la pastroj ne rajtas edziĝi kaj kial ilia amo al Dio estas ne akordiĝa kun la familia por kreado.

La Biblio ne diras ke la pastro ne rajtas generi. La pastro povus pli kompreni ol nun la diversajn problemojn de la kristanaj familioj.

Kelkaj kristanoj opinias ke la lingvo uzata en katolika diservo estas nur la latina. Mi estas kontraŭ tiu-ĉi opinio kiu estas maljusta ĉar la kristaj paroloj devas esti kompreneblaj por ĉiuj popoloj en ĉiuj lingvoj. En Francio, la diservo estas dirata en franca lingvo, por la tuta francanaro. Mi opinias ankaŭ ke la aborto estas kondamna por ĉiuj kristanoj, ĉar mi pensas ke la patrino kiu rifuzas sian infanon vivi, estas krimulino. Mi konsentas ke en iuj kazoj, kiam la patrina vivo estas en danĝero, la aborto povas esti necesa. Sed mi kondamnas la leĝo kiu rajtigas libere tiun pratikon. La preĝejo kondamnas la aborton. La seksa abstino antaŭ la edzeco estas bona afero ĉar mi opinias ke la edzeco ne estas nur simpla formalaĵo sed grava promeso kontraŭ la alia kaj Dio, kaj nur la morto aŭ la adulto povas rompi tiun promeson.

Mi opinias ke la kredo kaj la studaĵo pri bona kaj korpadona parolo povas helpi al ĉiuj ideanaj kristanoj ekkontakti niaj islamanaj fratoj, mi parolas nur pri pacaj, malperfortaj muzulmanoj. Ĉar mi opinias ke la kristana kaj muzulmana Dio estas la sama. La kristanoj devas ankaŭ ekkontakti la aliajn religiojn.

La studado kaj la traserĉo devas helpi nin bataligi la novaj idoloj kiel la mono, la egoismo la potenco, la rekta kaj malrekta rasismo, kaj la homa malmodesteco.

Mi petas al esperantistoj en ĉiuj religioj aŭ ateistoj esprimiĝi pri tiu temo per verkado de artikoloj en la Juna Penso.

Rolando TIERCE

## UFO-problemoj

Kiom da fantastaj rakontoj, legendoj pri UFOj. Preskaŭ ĉiuj aŭdis ion pri nekonataj flugobjektoj, "flugteleroj", el la vasta kosmo alvenantaj vizitantoj.
Ĉu ili ekzistas? Ĉu vere ili vizitas nian planedon?
Eble (!?)
Ankaŭ ni volas regi la spacon. Ankaŭ ni sieĝas la ĉielojn.
Vere ankoraŭ nia spacesplorado estas infanaĝa. Proksimume antaŭ cent jaroj ekaperis la unuaj aŭtomobiloj en la mondo. Homa sonĝo ĉiam estis flugi kiel birdo.
La unuaj aeroplanoj estis tre primitivaj, sed tamen ili flugis, vere ankoraŭ ne longan distancon, kaj ofte terenfalis.
Sed pasis la jaroj kaj jam post kelkaj jaroj ili kapablis transflugi oceanojn. Grandegaj rezultoj. Tamen oni deziris pli grandan rapidecon kaj altecon. Des pli alten. Venki la tempon kaj spacon.
60 jarojn post la unuaj aeroplanoj, homo flugis al la luno kaj promenis en la luna pejzaĝo.
Morgaŭ sekvos Venuso, Marso, Jupitero ktp, kaj eble post morgaŭ iu alia proksima galaksio.
Kial ne? - se homascio evoluas tiel rapidege kio okazos post cent, 200 aŭ mil jaroj? Ĉu nia kulturo, tekniko restos tia ĉi, kiel nun? Ĉu ĝi ne evoluos plu? Ankaŭ ni estos primitivuloj laŭ niaj nepoj kaj posteuloj, kiel nun laŭ ni niaj praavoj, kiuj veturis per ĉevalo. Hodiaŭ neniu miras, vidante aŭtomobilon, aeroplanon, aŭ aŭdante per radio aŭ televido ke oni ekirigis spacveturilon al la kosmo.
Laŭ nuna homo ne estas granda miraklo, nokte vidi flugantan lumeton aŭ brilantan punkton sur la firmamento.
Tial estis pli multaj ĉielsignoj antaŭ cent jaroj ol nun.
Nun oni jam ne rimarkas brilantajn aŭ lumantajn punktojn sur la firmamento, ĉar oni supozas, ke ili estas teraj, homfaritaj aeroplanoj aŭ spacveturiloj.
Aliflanke tiuj ĉi "flugteleroj" ne estas ĉiutagaj vizitantoj, kaj ne eblas vidi ilin amase.
Antaŭ jarcentoj kolektiĝis multaj rakontoj kaj eĉ - malofte - objektivaj pruvaĵoj pri ilia ekzisto. Foliumante la "Sanktan Biblion", ankaŭ en ĝi ni trovas multajn interesajn partojn, kiuj treege similas al UFO-rakontoj.
Ekzemple, interesa rakonto de la profeto Jeĥezkel.
Laŭ lia skribaĵo kelkaj sciencistoj konstruis modelon de la spacveturilo de Jeĥezkel. La esploradoj pruvis, ke liaj rakontoj estas precizaj: eblus konstrui tian spacveturilon.
Sed ankoraŭ la nuna tekniko ne estas tiel evoluinta, ke oni povus fabriki similan spacveturilon. Eble post 10-15 jaroj.

De kie devenas la granda scio de egiptoj antaŭ jarmiloj?
Kial oni konstruis tiujn gigantajn piramidojn?
Ĉu ili estis tomboj de faraonoj?
Eble (!?)
Aŭ ĉu per ilia helpo oni priesploris la ĉielon?
Eble (?!)
Ilia precizeco mirigas la vizitantojn. Oni nur gapas, kuŝante ĉe la piedo de piramido. Kvazaŭ oni estus en la ombro de alia mondo.
Ankoraŭ kiom da nekonataj sekretoj en la mondo!
Nun mi ne volas envicigi ilin, ĉar ili plenigus dikan libron. Pri ili la homa tekniko estas senkonsila.
Se tamen tiuj "flugteleroj" ekzistas, de kie ili alflugas nian terglobon?
Ĉu de najbara planedo?
Ĉu de malproksima galaksio?
Laŭ nunaj homaj scioj, sur la planedoj najbaraj al la Tero - Marso, Venuso, Jupitero, Saturnuso Uranuso, Pluto, Neptuno, Merkuro - ne eblas altnivela vivo. Sur ili ne estas taŭgaj vivcikonstancoj.
(Sed ĉi tie ni devas rimarki, ke pri ili ni scias ankoraŭ malmulte.)
Do restas la lasta hipotezo: flugteleroj alvenas el malproksimaj galaksioj.
Sciencistoj protestas. Ĉar laŭ ili flugteleroj ne povas alflugi nian planedon. Grandegan distancon, kiun eĉ la lumo traflugas multajn jarojn. Ekzistas galaksioj, de kie la lumo alvenas dum miliardoj da jaroj; ili neniiĝis jam antaŭ la naskiĝo de la Tero.
Ĉu objekto kaj homo kapablas flugi lumrapide: 300 000 km sekunde?
Denove ni devas konstati, ke laŭ niaj nunaj scioj kaj tekniko NE.
Sed kiel ni opinios pri tio post mil jaroj?
Ĉu tiel, kiel mezepoka homo pri globeco de la Tero? Ankaŭ tiam ekzistis homoj, kiuj antaŭvidis tion, sed oni primokis ilin, ofte eĉ mortigis pro iliaj asertoj.
Ofte oni punas tiun, kiu revas kaj kuraĝas fantazii. Tiajn homojn la aliaj primokas, priridas. Finfine, laŭ mi, altnivela civilizacio povas ekzisti en la kosmo krom sur nia terglobo, kies anoj vizitas nin kaj serĉas kontakton kun terloĝantoj.
Ankaŭ ni serĉas kontaktojn en la vasta kosmo kun aliaj civilizitaj mondoj. Tion pruvas niaj grandegaj teleskopoj, per kiuj oni esploras la ĉielon de tago al tago. Ofte ni sendas signojn al malproksimaj galaksioj, esperante ke ni ricevos respondon.
Eble baldaŭ niaj penadoj sukcesos, kaj plenumiĝos la miljara sonĝo, renkontiĝi kun pasaĝeroj de "flugteleroj".
Nidevos decidi, kiel ni akceptos ilin. Ĉu malpace aŭ amike?
Ĉu ni akceptos ilin per armiloj aŭ amikaj brakoj?
Estus plej bonaj la lastaj.

Béla Kovács

## ĈU NI ANKORAŬ NASKU

Ofte ni legas, ke estas tro multe da homoj sur nia planedo, kaj ke la nombro nepre malpligrandiĝu, alie...
Ĉiu samopinias pri tio, sed mi volas demandi, ĉu la homa vivo ankoraŭ valoras.

Infano, kiu naskiĝas, venas en la mondon, plenkreskas kaj finfine mortas.
Intertempe multo okazas.
Ĉiu ne nur estanta sed vivanta homo serĉas en sia vivo feliĉon, ĉar ĉiu volas agrable travivi la tempon ĝis la morto.
Unu kredas je Dio, alia je amo, tria je mono ktp. Ĉiu batalas, penas, agas por feliĉo; aŭ eble ne plu, ĉar ekzistas ankaŭ homoj, kiuj perdis la celon kaj vane vivas: ili restas vivantaj aŭ sinmortigas.
Infano, kiu ĵus naskiĝis, ankoraŭ ne scias, kia vivo al li plaĉas. Embrio ne petas vivon: la gepatroj faras.
La gepatroj faras tion ĉar ili volas gepatri aŭ havi grandan familion, ĉar tio estas amuza, aŭ por ligi sin tiel.
Ili ne pensas pri la estonta homo, kiu iel vivos. Ili ne scias, ke la infano eble estos en la mondo peono, kiu eble devos morti por gajni militon, kiu devos konsumi por gajnigi fabrikojn, kiu devos suferi ĉar iu atomcentralo malfunkciis, kiu vivos en malpurega medio, kiu timos estontajn militojn, kiu batalos por egaleco kaj justeco, kiu ne plu rajtos havi propran opinion, kaj kiu certe estos ano de la tro granda mondloĝantaro.
Infanoj naskiĝadas, gepatroj povadas ekgepatri.
Infano ne estu ludilo, nek de gepatroj nek de ŝtato.
Tial estus bone, se konsciaj homoj ne plu naskus.
Tiel ni evitas malfeliĉon, tiel ni jam helpas la malpligrandiĝon de la mondloĝantaro, kaj tiel ni donas al vivantaj homoj ege pli grandan ŝancon je feliĉo.

P.S. Gepatremuloj povas ja adopti infanojn.

Frans

### 9 monatoj / 5 jaroj

Ni havas 2 infanojn, sed ne volis adopti infanon.
Estas pli facile fari infanon (9 monatojn) ol adopti (5 jarojn aŭ pli, aŭ neniam infanon ĉar ni estas ne sterilaj)
Mi estas konscia, ke iliaj vivoj estos malfacilaj, sed mi ne povas vivi sen infanoj, tio estas egoista.
Tio turmentas min, mi kredas ĝin granda kaj serioza problemo.

Janine

NE, definitive NE, ni ne plu nasku! Ni fariĝu konsciaj, kaj ni ne plu nasku! Sed, amikoj kaj gekamaradoj, ĉu utilas elkrii tion? Cu eblas atingi ĉesadon de la homfabrikoj? Mi petas, ke ni provu, fali en realon, kaj trafi la plej gravan punkton de la hom-naskiĝado, sub ĝia problem-plena aspekto.

Iu ajn el ni povus longe kaj vigle priparoli siajn personajn sentojn rilate al la vivo, komprenita laŭ ĝia plej tuja signifo: la vivo kiel unua signo, unua paŝo de la ekzisto. Sed nia maniero konsideri tian fenomenon - pli aŭ malpli pesimista, pli aŭ malpli entuziasta - bedaŭrinde (aŭ kelkfoje feliĉe) preterpasas la nivelon de la simpla, izolita individueco. Sen aprobi la leĝojn de la determinismoj, mi devas tamen rekoni, ke ili regas la homaron sub du precipaj formoj. La unua koncernas la tipajn psikologiajn reagojn de ĉiu ulo. La plej klera, la plej instruita, la plej ekvilibrigata persono surtere malofte rezistas al la plezuro, al la emo pretervivi tra idoj kun sia propra sango en la vejnoj; ĉi tiu reago estas sendube forte radikita en la homo: ĝi ligiĝas al la natura leĝo de reproduktado, kaj ĝi plenumas la nepran, kvankam tristegan, taskon kontentigi homajn bezonojn kiel, ekz. personan fieron kaj neceson povi sin konsideri "normala" ulo. Kaj nenio estas pli "normala" ol edziĝi kaj havi familion (kiom eble plej "perfekte feliĉan", "harmonian" ktp)

Ĉi tie ni jam eniras la duan, multoble pli tragikan, tipon de determinismo: la socian, kulturan, politikan, ideologian, ekonomian influon. Frans konsideras ke "estas tro multe da homoj sur nia planedo". Mi bedaŭras, mi sincere bedaŭregas, sed ŝajnas ke ne estas tia la opinio de sufiĉe granda kvanto de uloj. Ni prenu konkretan ekzemplon: Brazilion. Pli ol 110 milionoj da loĝantoj sur lando kiu oferas nur mallarĝan marbordan bendon de tero kaj la sudan (relative malgrandan) regionon kun loĝeblaj kondiĉoj. Pli ol duono de la lando suferas pro malbonaj naturaj vivrimedoj (troaj pluvoj aŭ, male, dezertaj regionoj tute sekaj, internaj malfacilaĵoj de region-komunikado). Al ĉio ĉi aldonu nedisvolvatan ekonomion, terure centrigatan sur la pli bonaj regionoj (marbordo, sudo). Kiel rezulto, oni havas:
1) koncentriĝo de la popolo en la industriaj

## Ĉu gravas?

Estas ja interesa temo, sed ĝis nun ne pruviĝis, ĉu ili ekzistas kaj kia speco de fenomeno ili estas. Eble estas psika bezono de la homo, kiu kreis ilin same kiel la religian fenomenon.
Estas evidente per kia fervoro ĉiuj detaloj kaj eĉ detaletoj estas kolektataj, por ke la amaso de "faktoj" pruvu almenaŭ la ekziston.
Laŭ mi: se ili ekzistas, bone, se ili ne ekzistas, ankaŭ bone.
Do nur marĝene interesas min tiu afero.
Estas tiom da solvendaj problemoj sur nia globo, kiuj multe pli gravas.

Uwe Lohse

## Ĉu duoblaj steloj?

Mi konfirmas, ke sciencistoj kaj ĝenerale la scienco ne scias ĉion en tiu ĉi afero. Sed daŭras eksperimentoj kaj observadoj kiuj donos certe en la estonteco rezultojn.
Laŭ komunikaĵoj de Pola Astronomia Centro, ĉe Pola Akademio de Scienco (PAN) oni informas, ke ili eksperimentas pri mirindaj sistemoj de duoblaj steloj, el kiuj unu estas ronda, la alia konstruata diske. Plej bona studado de la steloj konformis, ke ili troviĝas en konstelacio "Ĝemelo" ĉirkaŭ 300 lumjarojn for de la tero.
La pola teoria kaj modela studado klarigas la devenon de mirindaj steloj. Ili estiĝas per elradiado de multnombraj energioj. Verŝajne la fonto estas malleviĝo de materio sur tre malgranda objekto, al granda gravitmaso, ekz. "blanka pigmeo" aŭ "malgrandegulo" Se la objekto turbe turniĝas, tiam ĝia malsuprenturnita materio ne falos rekte, sed laŭ spirala linio. Tio kaŭzos la diskan formon de la stelo.
Verŝajne duoblaj steloj estas supozitaj "flugteleroj" aŭ ŝipoj de la planedo Marso.

Ryshard Butajlo

## Ĉu vizioj?

Kosmonaŭtoj ne trovis Dion - barbulon sur nubo. Kaj kristano nun forpelas tiajn Di-bildojn. Sed iuj volonte kredus al tia dio!
Ĉu UFO anstataŭas Marian kiel nomo de vizioj?
Verŝajne ambaŭ ekzistas - UFOj kaj vizioj.
Sed kredemo povas tordi sperton.
Kial tia sopir' al primitiva religio? Mi trovas la nubojn mem pli interesaj!

Kris

(daŭrigo de la 44-a CL)

centroj, kie ĝi vivas mizere, suferante pri manko da laboro kaj altekosta vivo; 2) lando kiu klopodas disvolviĝi kaj bezonas manlaboron grandkvantan kaj malmultekostan, kaj kiu ne povas instrui kaj kulturigi la popolon. Konsekvence, la estraro de la lando instigas al grandiĝo de la demografio, argumentante ke pli granda familio obligas ĝiajn gajnojn, kaj kunlaboras en la popoligo de la tuta patrio kaj en la industria disvolviĝo de la nacio. Kion vi volas, ke faru popol-amaso en tia situacio, krom neeviteble fari infanojn???
Pro tio mi diras al vi: la procento da konsciaj homoj estas terure malgranda; kaj la nombro de konsciaj homoj kiuj pretus kunlabori kun la ne-pligrandigo de naskiĝoj estas ankoraŭ pli ete eta. Pro tio ni daŭre elkriu: NE, definitive NE, ni ne plu nasku! por ke kelkaj pliaj uloj decidu finfine agi (aŭ malagi) ĝis kiam bonvena kaj senpacience atendata (homa/natura) katastrofo decidos helpi nin.

Lília

Laŭ televido, jen novaĵoj: bebo naskita en provtubo..."baldaŭ pluaj virinoj malfekundaj povos provi - sed kostos" kiom? Mi ne scias. "Kiom valoras homa vivo?" Kiom vi profitis...
Sekvis vortoj de amiko:
li legis artikolon pri Islando.
Tombejoj ne ekzistas. Mankas arboj.
Sed ĉiu familio havas korton kun arbo. Ĉiujn oni enterigas sen ŝtonoj - inter lafo kaj vulkanoj (rondiru l'akson, l'arbon de la mondo)

Nu, diru, kiun vi preferas - morton aŭ naskon? Jen komunikiloj helpas elekti (nur la monon donu mem)

Kris

42-a cirkulanta letero

## RACIO

Kiel bona membrino de SAT, mi memkompreneble deziras plenumi la statuton de la asocio. Relegante ĝin, mi memoris, ke la celo de SAT estas "helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj" kaj "forkonduki la homaron al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo".

Mi tuj poste serĉis en la Plena Vortaro, kio do estas la racio, per kiu ni devas pensi por alveni al alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo, kaj trovis jenan difinon: "kapablo koncepti kaj aserti la universalajn principojn de vero kaj kompreneblo per kiu la intelekto de homo diferenciĝas je tiu de bestoj"

Kaj nun mi staras en grandega embaraso, ĉar mi devas aserti ke, fakte, mi tute malkapablas koncepti, kiu principo de vero estis kaj estos (kaj estas) universale akceptata de ĉiu homo en ĉiu tempo, ĉiu lando, ĉiu civilizacio kaj ĉiu socia klaso .

Fakte la stato de mia intelekto estas komparebla al tiu, en kiu estis antaŭ jarcentoj la sovaĝuloj de Ameriko, Azio, Afriko kaj Oceanio. Gojinde estas, ke la filozofoj de Eŭropo konsciiĝis en la 18-a jarcento, ke ili kapablas koncepti universalajn principojn, kaj ke la stato de la evoluado de ilia civilizacio ebligis ĝuigi tiujn kompatindulojn per la lumo de la vero.

Mi petas do miajn gekamaradojn, helpadi min atingi pli altan ŝtupon de civilizo, sendante al LJP liston de la principoj de vero kaj kompreneblo.

Mi antaŭpetas la legantaron pri ekskuzo pro la neevitebla tedeco de tiu ĉi debato, ĉar, la principoj estantaj universalaj, ĉiuj partoprenantoj sendos similajn kontribuaĵojn. La malo pruvus, ke estas sovaĝuloj inter ni.


Ĉu ne estas la devo de ĉiu civilizita homo, helpadi al la sovaĝuloj? Do, gekamaradoj, mi petas pri helpado.

Jacqueline

---




Forko por dukapa homo



Forko por (unukapa) dumana homo

---


Forko por paro



Tenilo por ĉisupra forko



---



Forko por senkapulo



Buŝo por senkapa tenilo

---

Homa penso ne estas nur el racio, sed ankaŭ el sento kaj imago